# AVANCO

1/98

Januaro-Aprilo

(IX-a jaro, Nro. 3)

Oficiala organo de Kuba Esperanto-Asocio


SPECIALA NUMERO

E N H A V O

# ESTRARA RAPORTO

1997

# Estimataj:

Jen la unua eldono 1998 de la Oficiala organo de Kuba Esperanto-Asocio.

Ĉi kaze, AVANCO enhavas la Estraran Raporton 1997, detalplene rilate la agadon de KEA dum tiu periodo, celante ke vi havu la plej ampleksan bildon pri nia Asocio ĉiukampe.

Krome, ni aldonas la Aliĝilon de nia dua Kultura Esperanto-Festivalo.

Legu, analizu kaj reagu.

Via redaktoro,

J. Ramón



# NACIA ESTRARO

*Julián Hernández Angulo
Prez.. Atentas plenumon de ĉiuj taskoj kaj fakoj.

*Maritza Gutiérrez González
Ĝenerala Sekr.. Kontrolas internan agadon.

*Alberto Rodríguez Pineda
Financoj, k. administrado de la Centra Oficejo.

*Héctor Jiménez Batista
Instruado k. ILEI-Sekcio.

*Juan Ramón Rodríguez Gómez
Informado, Historio, Bibl., Libro-servo kaj Ameriko. Ĉefredaktoro de Avanco, La Noktuo kaj Universo.

*Pedro Fernández Rodríguez
Kulturo. Artaj k. klerigaj aranĝoj.

Komisiitoj

*Martha Alonso Gutiérrez
Turisma agado.

*Juan Lázaro Besada Toledo
Atento al verkistoj.

*Alberto García Fumero
Scienco kaj tekniko.

IX-a jaro, nro. 3 (1/98, jan.-apr.) / Aperas 3 foje jare / Eldonas: Kuba Esperanto-Asocio / PF.: 5120; 10500 Havano, Kubo / Telefonnumeroj: 40-1364 kaj 40-4484 / Fakso: 53 7 33 8729 / Retadreso: kubesp@mail.infocom.etecsa.cu / Ĉefredaktoro k. grafika aranĝo: Juan Ramón Rodríguez / Revizio k. korektado: Maritza Gutiérrez / Kunlaboris: Nacia Estraro / Komputila aranĝo: Roberto Molina / Prezo: 1:00 CUP (enl.), 2.00 NLG aŭ 2 Irk. (eksterl.), pagendaj al KEA-konto ĉe UEA: keaux-u / Ĉiuj rajtoj rezervitaj / Reproduktado permesata (indiki fonton k. sendi 2 ekz. al la Redakcio).

## ENKONDUKO

Disvastigi la uzadon de la internacia lingvo Esperanto; arigi ĉiujn kiuj pretas organizite labori cele al instruado, disvastigo kaj utiligo de E-o; plifaciligi ĉiuspecajn spiritajn kaj materiajn rilatojn inter la homoj, malgraŭ diferencoj de nacieco, raso, sekso, religio, ideologio aŭ lingvo; kreskigi inter siaj membroj fortikan senton de solidareco kaj disvolvi ĉe ili la komprenon kaj estimon por aliaj popoloj, estas la ĉefaj celoj de KEA kaj ni, naciaj komitatanoj venis al Bayamo, Granma el diversaj landopartoj por analizi kiom multe kaj ĝis kia grado ni plenumis ilin.

La perspektivoj de nia kara Asocio estas grandparte sur niaj dorsoj kaj de ni dependas la sukcesa estonteco de nia esperantista vivo. Ne ĉiam ĉio plenumiĝas tiel glate kaj rapide kiel ni deziras, kaj tio kelkfoje estigas malesperojn kaj senpaciencojn, sed ni devas konscii ke ni estas homoj kun malsamaj trajtoj kaj karakteroj, kun malsamaj profesioj kaj niveloj. La plej grava fakto estas ke ni ĉiuj iel aliel dediĉas grandan tempon el niaj vivoj batalante kontraŭ la nuntempaj vivopremoj kaj cirkonstancoj, klopodante ke la trezora fenomeno E-o estu pli lingva, pli kultura, pli socia en nia evoluanta socio. Tio ja estas laŭdinda.

Sendube la tempo estas unu el la plej grandaj instruistoj kiam oni estas bona lernanto. Lernado estas proceso kiu postulas analizon kaj meditadon, kaj ni devas sufiĉe bone ĉerpi ĉiujn instruojn kaj spertojn respegulitajn en tiu ĉi raporto, celante ke nia estonta laboro estu ankoraŭ pli serioza, pli respondeca kaj pli kvalita. Nur tiel ni atingos la sufiĉan profesiecon, kio ebligos al ni sukcese realigi niajn futurajn planojn.

## 1. INFORMADO

Jam ekde la pasinta jaro ni decidis prioritati tiun ĉi fakon pro la rekta influo en la sekvaj agoj de la Asocio. Estas nepre daŭre atenti ĝin tial ke de bona informado dependas la varbado de novaj interesitoj pri la lingvo. Dum tiu ĉi jaro je nacia nivelo ni povas taksi la informan agadon kontentiga kvankam ni ne povas kontentiĝi pro tio ke informi estas konstanta bezono de la E-movado.

1.1. Ni regule informis jen al la esperantistaro jen al la ĝenerala publiko. Al tiu ĉi lasta ni informis ĉefe per radiostacioj naciskalaj kiaj Radio Progreso kaj aliaj provincaj radiostacioj en Santiago de Cuba, Granma, Urbo Havano kaj Camagüey, kie regule okazadis disaŭdigoj pri E-o. Ankaŭ nepre menciindas la regula apero de la E-elsendoj per Radio Havano Kubo per kiu nia Asocio regule elsendas en E-o informojn pri E-o kaj pri nia lando. Reeĥoj konstante alvenas per leteroj, gazetoj kaj la elektronika poŝto, kiu cetere fariĝis dum tiu ĉi jaro tre utila komunikilo por KEA, tial ke ni jam havas paĝon en Internet per kiu la esperantistoj tra la mondo povas informiĝi pri KEA kaj E-o.

Nia ĝenerala manko en tiu ĉi punkto estis la grafika informado al la ekstera publiko, kion sukcesis plenumi la filio Camagüey per la ĵurnalo provinca Adelante (Antaŭen) kaj ankaŭ per la bulteno Antaŭen en E-o kaj per aliaj grafikaj propagandiloj propra iniciate entreprenitaj de la filio. Tamen ni konscias ke la situacio multe varias laŭ la teritorioj. Ni devas multe pli agadi tiudirekte, kvankam pro la sciataj kondiĉoj de la gazetaro tutlande tre malfacilas atingi spacon en ĵurnaloj.

Aliaj propagandaj aranĝoj plenumitaj tra la lando estis E-ekspozicioj en tiu provinco kaj en Sto. Domingo, Pedro Betancourt, Cienfuegos.

Tre gravas mencii ke dum la jaro ni profitis la okazon informi pri E-o dum kunsidoj kun estraranoj de diversaj asocioj kaj speciale menciindas la Simpozio pri Fernando Ortiz, kie estis prezentitaj du prelegoj kiuj, je alta nivelo, diskonigis la rolon de E-o kiel tutmonda komunikilo kaj pri la agado de Dro. Ortiz favore al la lingvo. La evento estis kunaŭspiciita de Kuba Asocio de UN kaj ĝi brile kontribuis al diskonigo de E-o inter elstaruloj de nia lando, kiel ekz. Conchita Fernández, iama sekretariino de Dro. Ortiz.

1.2. Dum la jaro je tutmonda skalo oni parolis pri Kampanjo 2000 kaj pri la bezono konsciigi la membraron pri la rolo de E-o. Parto grava de nia informa tasko estis la persona kaj konstanta informado per rondoj kun kursanoj, lernantoj de aliaj lingvoj, infanoj, tendaroj. Ni konsideras ĝin ekspluatenda laboro kiu farendas pli konscie kaj atente, kvankam plenumitas ĝenerale.

1.3. Rilate al la asociaj organoj, ni sukcesis plenumi tiun taskon pli bone ol en antaŭaj jaroj, tial ke ni eldonis la hispanlingvan bultenon Universo, kiun ni devas plimultigi por atingi pliajn instituciojn kaj homojn kiuj povas estonte kontribui al la asocia laboro. Ankaŭ estis eldonita la organo de KEA nome Avanco trifoje jare laŭ planite kaj La Noktuo sesfoje jare, eĉ kun pli bona kvalito. En tiu senco, ni devas eltrovi pli bonajn mekanismojn por ĝia akurata distribuado tra la lando.

Dum 1997, la filio Camagüey ekeldonis sian bultenon Antaŭen kvalite kaj regule, kio multe utilas al la informa laboro inter la esperantistaro en la teritorio kaj ankaŭ kontribuas al diskonigo pri ilia laboro eksterlande.

1.4. Pri regula apero de KEA en la internacia gazetaro, ni daŭre instigas la esperantistojn kapablajn, tion fari, kaj tiucele kontribuas, interalie, Norberto Díaz per la bulteno Jajabo. Aliaj esperantistoj tradicie tion faras per informoj, literaturaĵoj, intervjuoj kiuj dum la jaro aperis en gazetoj kiaj Esperanto, Monato kaj Heroldo de Esperanto.

## 2. DISVASTIGO TRA LA LANDO KAJ REVIGLIGO DE FILIOJ

Rilate al disvastigo de nia movado tra la tuta lando, direndas ke nia ĝenerala

plano estis grandparte plenumita foje pli bone foje ne kiel atendite, sed en aliaj okazoj tre bone. Temas pri konstanta bezono de la Asocio kreski kaj disvastigi la movadon malgraŭ tio ke ne ĉiam ni sukcesu en difinita periodo, kio neniel povas malentuziasmigi nin, sed male instigi nin al konstanta semado. Krome, ni klopodis revigligi filion Quivicán, kie restas kelkaj entuziasmaj esperantistoj, kaj ankaŭ sukcesis revigligi filion Isla de la Juventud, per dujara strebado kaj ankaŭ helpite de havanaj esperantistoj.

2.1. Holguín iom progresis dum la jaro. Tie daŭre laboras Isnel Pupo kape de la movado. La prezidanto de KEA vizitis ilin kaj kune vizitis diversajn malnovajn esperantistojn. La rezulto estas ankoraŭ atentinda, sed tie mankas teamo.

2.2. Cienfuegos estis plano ankaŭ plurjara kiu finfine fruktedonis. Post diversaj agoj flanke de KEA, la rektan laboron surloke entreprenis Norberto Díaz kaj José Luis Montes de Oca per sindonema instruado regula kaj propagando surloka. Nuntempe tie ekzistas grupo kiu montriĝas serioza kaj entuziasma.

2.3. Villa Clara. Estas tasko ankoraŭ ne plenumita, kvankam tie ekzistas kelkaj homoj, sed nenia vera aganto. Ĝi daŭre restas kiel farendo por la venonta jaro kaj tiucele la centraj filioj certe havos grandan influon.

2.4. Pinar del Río. Malgraŭ pluraj klopodoj per leteroj, telefonaj vokoj, vizito komence de la jaro kaj konstanta sendado de niaj protokoloj kaj aliaj komunikoj dum la jaro, ni ne sukcesis revigligi tiun grupon. En decembro estis sendita aperta letero al pluraj iamaj asocianoj atendante ian reagon en la teritorio mem. Ni daŭre insistos tiudirekte por revigligi la grupon en la okcidenta provinco.

2.5. Ciego de Avila havas grupon en Morón kiu dum la jaro regule funkciadis sed ne okazis la atendita progreso.

2.6. Matanzas. Ni ne sukcesis kreskigi la movadon de Pedro Betancourt al aliaj teritorioj, kaj en tiu municipo mem ĝi ne avancas, tamen menciindas la laboro regule farata kun lernejanoj en E-rondo, ekspozicioj kaj aliaj aranĝoj ligitaj al la infanaro.

2.7. Granma. En tiu ĉi regiono la laboro estis tre bone plenumita danke al la teamo tie laboranta kiu dum 1997 sukcesis iom kreskigi la membraron kaj organizite kaj entuziasme labori ankaŭ rilate al la preparo de la komitata kunsido.

## 3. ORGANIZAJ DEMANDOJ KAJ INTERNA ADMINISTRADO

La jaro 1997 markis la 18an jariĝon de KEA kaj, rezulte, konfirmon pri maturiĝo de la asocia laboro, specife en tiu ĉi fako, kiu konsistigas la dorsan spinon de

la movado. Malfacilaĵoj kaj spertoj interplektiĝis por strebi al pli sukcesa agado tiurilate.

Ĝenerale la organiza laboro tutlande kondutas pozitive kaj pli koherE, kio videblas en la reguligo de informa interŝanĝo kaj la ebleco entrepreni statistikan raporton pli kompletan ol en la antaŭaj du jaroj, tamen mankis ekvilibro tra la tuta lando en la senco ke ne ĉiuj filioj laboris kun konscio pri la bezono ke niaj komunikoj kaj informoj estu, ne nur realaj, sed ankaŭ oportunaj por agadi laŭ la cirkonstancoj kaj en ĉies favoro. Ankaŭ ni kiel Nacia Estraro pli kaj pli devas profiti ĉiujn rimedojn por reguligi tiun aspekton kaj impulsi la organizan laboron, kontrolon kaj helpon laŭnecese.

3.1. Membro-kontrolo kaj kotizo. Kontroli la asocian membraron konsistigas kiel tradicie kernan aspekton en nia laboro kaj tiusence direndas ke la situacio estis kontentiga, kvankam notindas ke nia membraro en regionoj antaŭe multenombraj ne havis tiun favoran situacion dum 1997, kio ne bone efikis la ĝeneralan statistikon kaj negative influis la enspezojn pro koncepto de kotizoj. Tamen, la kontrolo kaj informo al la Nacia Estraro bone funkciis tra la tuta lando, kio kontribuis al plenumo de tiu ĉi tasko.

STATISTIKO PRI MEMBRO-KONTROLO 1997

| FILIO | SEMESTRO I | SEMESTRO II |
|---|---|---|
| Isla de La Juventud | 22 | - |
| Pinar del Río | - | - |
| Urbo Havano | 99 | 136 |
| Havano | 1 | 1 |
| Matanzas (P. Betancourt) | 10 | 15 |
| Villa Clara (Santo Domingo) | 33 | 34 |
| Cienfuegos | 35 | 18 |
| S. Spíritus | 11 | 11 |
| C. de Avila (Morón) | 10 | 2 |
| Camagüey | 149 | 191 |
| Las Tunas | 21 | - |
| Holguín | 12 | 42 |
| Granma | 42 | 56 |
| Santiago de Cuba | 93 | 99 |
| Guantánamo | 36 | 32 |
| Totalo | 574 | 637 |

Rimarkindas ke filio Santiago de Cuba jam ekde la pasinta jaro konsiderinde perdis membrojn kaj tiusence ili devas labori dum tiu ĉi jaro por ne perdi la rajton

havi kroman reprezentanton dum la venontjara komitatkunsido kaj ankaŭ por garantii progreson de la movado en la regiono. Aliflanke, alia filio kiu havis similan konduton estis Urbo Havano, sed nur dum la unua semestro 1997, kio evidente pliboniĝis dum la dua semestro.

Tute kontraŭe okazis kun Cienfuegos, Isla de la Juventud kaj Granma, kie la membraro kreskis kaj en tiu aspekto menciindas la stabila kaj progresema laboro de Camagüey, kiu ekde la pasinta jaro montras pozitivan tendencon tiurilate. La ceteraj kondutas pli malpli stabile, kvankam kun escepto de Santo Domingo, ilia membraro estas malmulta kaj oni devas alstrebi kreskigi la ciferon eĉ se diskrete.

3.2. Atento kaj vizitoj al filioj. Estis tasko plenumita. La Nacia Estraro, vizitis ĉiujn filiojn laŭ planite kun la solaj esceptoj de Las Tunas, pro situacioj surloke, tiel ke ili ne povis pretigi la viziton. Rilate al Sto. Domingo, ĝi estis prokrastita laŭ peto de José Luis Montes de Oca pro praviglitaj kialoj. Tiuj du filioj nepre estos en la kalendaro por 1998. En tiu laboraspekto multe kontribuis la naciaj renkontiĝoj organizitaj en Camagüey, S. Spíritus kaj Guantánamo, kie multobliĝis la kontaktoj.

3.3. Kontrolo de Membroj-subtenantoj. En tiu ĉi laboraspekto ni alfrontis malregulaĵojn kaj fakte la rezulto ne estis kiel ni atendis. Same kiel en 1996, la komisiito pri MS klopodis enketi pri la kvanto de tiaj membroj tutlande kaj la reago ne estis bona, kio ja estigis dubojn pri kiel pli bone agi, do ĉi momente ni decidis ellabori pli simplan manieron aktualigi tion pere de la membrokontrolo kaj ni rekte okupiĝos kun la kontribuo de la oficistino. Ni jam entreprenis tian kontrolon pere de la filiaj membrokontroloj, sed ni devas konscii ke tre gravas la filia agado surloke jen en la kontrolo jen en la atento, sendepende de nia laboro tiusence.

Ni speciale petas kunlaboron en la senco regule detaligi la informojn por plifaciligi la aktualigon niaflanke. Pri tio tre bone agas Santiago de Cuba kaj Camagüey, kiuj faras subdividon laŭ kategorioj de membroj. Ĝenerale ni povis elĉerpi la informojn el la filiaj raportoj kaj ni jam komencis labori por ke tiu ĉi tasko estu pli bone entreprenita dum 1998 kaj ke ni tra la tuta lando pli bone atentu tiajn membrojn. Dum 1997 ni sendis al ili la bultenon Avanco kaj La Noktuo.

3.4. Atento al komitatanoj. Flegi la internan informan fluon. En januaro 1997 okazis la 14a Komitatkunsido, en Guantánamo, kie la komitatanoj laboris sub bone kreitaj kondiĉoj de la tiea teamo. La interkonsentoj kaj aprobita buĝeto estis sekve informitaj al MINJUS kaj ankaŭ senditaj al la komitatanoj. Dum la jaro ankaŭ estis senditaj ĉiuj protokoloj al la prezidantoj de filioj kaj laŭnecese estis senditaj leteroj, cirkulero pri membrokontrolo kaj telefonaj alvokoj por aliaj bezonataj kontaktoj. Tiu ĉi tasko estis plenumita kaj komunikoj ĝenerale fluis inter ni, escepte kun Pinar del Río el kie nenia reago venis.

Fakte, menciindas ke dum la jaro protokoloj estis regule ricevitaj de Camagüey, Granma, Santiago de Cuba kaj Sto. Domingo, kiu krome sendas regule informajn

leterojn pri Cienfuegos kaj aliaj taskoj plenumitaj rilate al la agado en la centra regiono. Jam antaŭ la jarfino ni ricevis protokolon kaj aliajn leterojn de Cienfuegos, el kiuj evidentiĝas ilia aktivemo. En tiu senco, Urbo Havano konscias pri siaj mankoj laŭlonge de la jaro, en la senco ke ili ne sendis eĉ koncizan protokolon post kunsidi, kvankam direndas ke ili suferis je manko de estraranoj kaj tio influis negative en la organiza laboro de la filio.

En rilatoj kun aliaj aspektoj de la interna funkciado dum la pasinta jaro, ni devas mencii ke la Nacia Estraro efektivigis ĉiumonatan ordinaran kunsidon kaj aliajn eksterordinaran laŭnecese. Oni strikte kontrolis la plenumon de la ĉefaj taskoj kaj, periode, la laborraporton de estraranoj.

Rilate al aliaj internaj aferoj, ni reorganizis plurajn dosierojn en la arkivo per laboro kun la oficistino kaj nia arkivo estas nun en pli bona oganiza stato. Tiusence, ni ricevis kontrolviziton de MINJUS kaj MINCULT ĝuste pri la organiza aspekto kaj la rezulto estis tre bona. Ili sciigis tion kaj eĉ diris ke nia Asocio estis la unua kontrolita pro tio ke jam tradicie ili konas nian laboron kaj estas pli bone komenci per asocio enorda. Ni konsideras ke tio validas ne nur por la organiza laboro je nacia nivelo sed ankaŭ en la filioj tra la tuta lando.

Rezulte de tio ni informiĝis pri la stato de niaj filioj kaj speciale pri Quivicán, kiu serioze riskis je fermo pro malaktivado. La prezidanto mem iniciatis kontakton kun iamaj aktivuloj kaj poste estis organizita alia renkontiĝo surloke. Nuntempe estas oficialigitaj en MINJUS la jenaj filioj:

Santiago de Cuba (provinco kaj municipo), Granma (prov. kaj mun.), Camagüey (prov.), Holguín (prov. kaj mun. Gibara), Ciego de Avila (prov.), Sancti Spíritus (prov.), Villa Clara (prov. kaj mun. Sta Clara kaj Sagua), Urbo Havano (prov. kaj mun. Centra Havano), Havano (mun. San José kaj Quivicán), Isla de la Juventud.

En proceso estas Guantánamo (municipo), sed nuntempe MINJUS nenion faras tiusence, pro transformoj farataj en la Leĝo de Asocioj je nacia nivelo.

Aliaj filioj, kiaj Sto. Domingo tradicie laboris sen bezono je oficialiĝo kaj, laŭ informo de la prezidanto Montes de Oca, eventuale oni ne bezonas tion entrepreni almenaŭ dum 1998. Tamen, ni devas zorgeme analizi la evoluon de la koncernaj leĝoj, kaj multe pli post apero de la nova leĝo, por decidi pri kio plej konvenas al la Asocio en la estonteco en tiuj kazoj.

Dum la menciita kontrolvizito estiĝis la propono aktualigi niajn rilatnormojn kun la koncerna organo de rilatoj, nome MINCULT (Eldonejo J. Martí) pro tio ke jam la situacio variis kaj estas oportuna momento. Surbaze de tio, ni ellaboris novan proponon de rilatnormoj, pridiskutis la dokumenton en la Estraro kaj poste transdonis ĝin al la eldonejo. Nuntempe, ni atendas la reagon. Kompreneble, ni konscias ke temas pri bezonata dokumento kiu devas ankaŭ kontribui al leĝa fundamento por la laboro ankaŭ en la diversaj teritorioj, sed pli ol dokumento ni devas zorgi la surlokajn rilatojn kaj kontaktojn kiel ĝis nun.

Ĝenerale tiu ĉi tasko estis plenumita, sed ni devas daŭre atenteme agadi tiel ke nia interna komunikado kaj komunikiĝemo estu regula kaj bonefika .

4. FINANCOJ

4.1. Kiel tradicie per la koncerna buĝetado, la Asocio fiksis sian strategion de la jaro kaj ĝin aprobis la Komitato. La realaj kondiĉoj de la lando tre malfavore influis tiun aspekton kaj pro tio dum la jaro ni konstante analizis la plenumadon de tiu strategio. Ni plenumis ĝin rilate al BFI, sed ne en BNC, interalie pro tio ke ni ne sukcesis enspezi la bezonatajn ciferojn rilate al kotizoj, libroservo kaj perkoresponda kurso, esence. Tiudirekte, ni devas serĉi variantojn por venigi pli da homoj al la PKK kaj al la Asocio entute.

4.2. Tiurilate estis plenumita niaj planoj, tamen ni devas konscii ke bezonatas plialtigi la kvanton kaj kompreneble regulecon en la eldonado de materialoj kiuj devas subteni la financan agadon de la Asocio.

4.3. Pri atento al la filioj kaj la konsciigo pri memfinancado, ni taksas la laboron plenumita, tial ke pli kaj pli la estraroj en la teritorioj prizorgas sian buĝeton kaj ties plenumon. Kiel memfinancata institucio, ni konstante instigas al memzorgado tiurilate kaj evidentas ke la plimulto el niaj filioj scias-konscias pri tio kaj laŭeble plenumas ĝin.

5.- INSTRUA AGADO

La laboron dum la nuna jaro ni povas taksi kontentiga en rilato kun la antaŭaj jaroj, kvankam ankoraŭ, malfeliĉe, ne sufiĉe glatas la bezonata informfluo. Ĉijare ni rekte ricevis informojn de nur sep provincoj: Villa Clara (Santo Domingo), Cienfuegos. Sancti Spíritus, Camagüey, Granma, Santiago de Cuba kaj Guantánamo kaj ankaŭ de la speciala municipo Isla de la Juventud. Jam je la fino de la jaro, pere de informoj senditaj al la Ĝenerala Sekretariino, ni sciis pri la laboro farita ĉikampe en Granma kaj Matanzas (Pedro Betancourt).

Tamen, ekde informa vidpunkto, se ni komparas tiun ĉi jaron kun la antaŭa en kiu ni ricevis informojn nur el tri provincoj, la rezulto estas pozitiva, sed ni devas insisti pri la ĝustatempa sendado de la informoj rekte al la Sekretario pri Instrua Agado kaj la korekta kompostado de la senditaj datumoj, tiel ke la jarraporto respegulu pli kompletan bildon kaj en pli bona maniero la rezulton de nia laboro.

5.1. Regulaj Kursoj. Ĉijare, laŭ la ricevitaj raportoj de filioj, funkciis regulaj E-kursoj en Villa Clara, Cienfuegos, Santiago de Cuba kaj Isla de la Juventud. Je la fino de la jaro, la Ĝenerala Sekretariino ricevis informojn el Granma, Urbo

Havano kaj P. Betancourt, kvankam nur aperas kelkaj ciferoj en tiu de Granma. Tamen laŭ nia scio kaj personaj kontaktoj, kvankam sen statistikoj, ankaŭ oni instruis regulajn kaj aliajn kursojn en Urbo Havano, Sta. Cruz del Norte (perkomputila infanrondo), S. Spíritus (en La Aurora), Las Tunas kaj Guantánamo.

Oni devas elstarigi la laboron faritan flanke de la filio Camagüey, kiu organizite kaj teame atingis tre bonajn rezultojn, kiel en aliaj kampoj de la asocia vivo ankaŭ en la instruado.

5.2. Perkoresponda Baza Kurso (PKK). En rilato kun la PKK, krom Urbo Havano, kies interesitoj estas rekte atentitaj de la Nacia Estraro; kaj Guantánamo, kiuj tre alproksimiĝis al la kvoto, la ceteraj provincoj ne plenumis la kvoton fiksitan dum la pasinta Komitatkunsido. Sendube, ni devas multe pli labori kiel ajn por plibonigi tiujn ĉi rezultojn.

Ni konsideras ke la bazo por atingi tiun celon estos la propagando mem, kiu devas esti daŭra, sufiĉe alloga kaj okulfrapa. Ni profitu ĵurnalojn, radioelsendojn kaj ĉiujn rimedojn je nia dispono por almenaŭ ion diri en rilato kun tiaspecaj kursoj, kiuj malfermas pordon de nia movado al novaj membroj, al novaj kaj freŝaj fortoj. Ni insistu ke, same kiel oni analizis dum la pasinta Komitatkunsido, la PKK daŭre restas kiel la plej bona alternativo por personoj kiuj ne povas ĉeesti regulajn kursojn kaj ankaŭ por atingi lokojn kie ne ekzistas organizita Esperanto movado.

5.3. Distanca Kurso (DK) Ŝajnas ke ankoraŭ mankas intereso naciskale pri tiaspeca kurso ĉar el 49 elektitaj personoj por ricevi ĝin, same kiel ni informis la pasintan jaron, restas aktivaj en la kurso ne pli ol kvin personoj. Tiun taskon devas preni sur sin la provincaj kaj municipaj estraroj de filioj por ke ties membroj, ĉefe estraranoj mem kaj aktivuloj, ne perdu tiun ŝancon plialtigi la lingvan kaj kulturan nivelon ene de la Asocio. Ni konsideras ke, se la elektitaj personoj havas neniun intereson pri la DK, la filioj devas elekti aliulojn, kiuj multe pli serioze entreprenu tiun gravan taskon por la estonteco de la Asocio kaj sendi la difinitan liston de interesitoj al la Nacia Estraro antaŭ la 15an de marto 1998.

5.4. Atento al ILEI-sekcio. Nia ILEI-reto ne estas stabila tra la tuta lando kaj eĉ ekzistas kelkaj provincoj kie la ILEI-reprezentanto estas la prezidanto mem, kio povas negative influi en ilia laboro, pro la fakto ke ili ne povas dediĉi sin al sia ĉefa tasko: kontroli, gvidi kaj garantii la tutan avancigon de ĉiuj asociaj laborsferoj en la koncernaj teritorioj. Tamen, ĝis aperu la taŭga persono, ne ekzistas alia alternativo.

Kiel okazas jam de pluraj jaroj, KEA estis reprezentita en la ILEI-Konferenco okazinta en Geelong, Aŭstralio, kio malfermas nin al konstanta spertiĝo kaj, krome, dum la jaro estis periode ricevitaj la revuoj IPR kaj Juna Amiko, el kiuj ni pli kaj pli eltiros utilajn spertojn de aliaj instruistoj.

5.5. Nacia Seminario por Instruistoj. La tutlanda seminario okazinta en julio/ 97, laŭ la opinio ne nur de la partoprenintoj sed ankaŭ de la tuta stabo, kiu organizis kaj respondecis pri ĝi, estis multe pli sukcesa ol la antaŭaj. Oni ŝanĝis la stilon de la Seminario, kiu fariĝis metiejo, kie ni ĉiuj plialtigis nian instrukapablon kaj interŝanĝis spertojn, kio sendube estis fruktodona por ĉiuj partoprenintoj.

Ĉeestis la Seminarion 13 personoj el diversaj filioj kun bonaj rezultoj. Tamen, ni daŭre instigas la filiojn klopodi partoprenigi tiujn ĉi seminariojn, personojn, kiuj pli bone povus profiti tiun eventon, kiu estas tre grava por la Asocio, sed ankaŭ devigas nin elspezi sufiĉe grandan kvanton da mono, energio kaj tempo.

Aliflanke, kvankam ni multe rimarkis la bezonon organizi provincajn seminariojn post la okazIĝo de la tutlanda, laŭ la ricevitaj informoj nur Camagüey tion faris. Ni devas konscii pri tio por ke tiuspecaj seminarioj vere plenumu sian rolon.

## 6. KULTURAJ KAJ KLERIGAJ ARANĜOJ

6.1. Pri la agado de KEA rilate al konsciigo de la membraro en historiaj kaj kulturaj valoroj de la Asocio ni konscie agadis kaj plenumis ĝin dum 1997, sed ĝi estas laborsfero pri kiu ni devas agi persiste kaj obstine, ĉar nur paŝon post paŝo ni sukcesos plialtigi tiun konscion en niaj samideanoj kaj krei en ili aparten-senton al la movado. Ni plu devas serĉi viglajn kaj allogajn rimedojn por tiu edukado en la valoroj de la E-movado.

6.2. KEA konstante zorgis pri la kultura aktivado de la filioj, specife en tiuj teritorioj kie oni organizis kulturajn renkontiĝojn, nome Camagüey, Sancti Spíritus kaj Guantánamo; al ili, ni adresis materialojn por iel orienti la preparon kaj plibonigon de la kulturaj programoj, sed ĝenerale ili mem jam sukcesas multon krei en tiu direkto; tamen, ni konscias ke mankas reguleco en tiu agado, eĉ en la nacia sidejo.

Plia tasko farita estis sonregistrado de kasedoj kaj eldono de kanzonaroj, kion ni daŭre klopodos plireguligi laŭbezone.

Komence de la jaro, la Kultura Fako de KEA organizis tradukan konkurson, kies bazoj estis transdonitaj al la komitatanoj dum la pasinta Komitatkunsido, kaj bedaŭrinde ni konstatas, pro la reago (nur unu konkursaĵo), ke la filioj ne disvastigis ĝin. Tiusence, ni devas serĉi aliajn strategiojn; sed, esence, kiam temas pri naciaj konkursoj kiuj instigas al memstrebado kaj, do, al plikleriĝo de la membraro, la filioj devas aktive ebligi al siaj membroj partopreni tiajn aranĝojn, kiuj sendube kontribuas al la kultura agado de la Asocio.

6.3. Ni daŭre laboris dum la jaro pri atento al niaj artistoj jen amatoraj jen profesiaj, provizis ilin per materialoj kaj, en la preparoj de la kulturaj renkontiĝoj por la festivalo en Santiago, tra la tuta lando okazis pliproksimiĝo al diversaj

artistoj kaj ili preparas sin por reprezenti la filiojn dum la evento. Tamen, kiel ĝenerala aspekto, ni devas konstante flegi tiun atenton kaj ampleksigi ĝin al varbado de novaj artistoj ene aŭ ekstermovade. La tutan jaron, la Asocio ĝuis la E-arton de la aktorino Georgina Almanza en diversaj aranĝoj, menciindas la partopreno de Julián Hernández en la Internacia Vespero kaj aliaj aranĝoj de la 82a Uko kaj de la ILEI-Konferenco.

6.4. Dum la jaro, la Asocio profitis diversajn eventojn por reprezentiĝi en eksterasociaj kulturklerigaj aranĝoj, jen nacie jen en la diversaj provincoj, per partopreno en eventoj de UNO-Asocio (prelegoj fare de Juan Ramón Rodríguez, pri Fernando Ortiz; kaj Juan Lázaro Besada, pri E-o en la internaciaj rilatoj), de la Unuiĝo de Artistoj kaj Verkistoj en diversaj teritorioj, kiaj S. Spíritus kaj Granma; ankaŭ en evento de Eldonejo J. Martí (prelego pri E-o kiel traduklingvo, fare de Martiza Gutiérrez), kaj aliaj. Ni konscias ke tiu ĉi estas konstanta bezono de la Asocio kaj ni devas regule alstrebi al ties plenumo.

6.5. Rilate al korekta utiligo de niaj bibliotekaj servoj, ni konsideras ĝin principe ne plenumita naciskale, malgraŭ pluraj instigoj tiusence. En la nacia sidejo, la komisiito pri biblioteko, nome Juan Ramón Rodríguez, finpretigis detalan kontrolon pri la E-gazetaro trovebla ĉe la biblioteko de KEA (laboro prezentita en SAEST'97), kaj ankaŭ pretigis kontrolon de E-libroj kaj aliaj materialoj por ekspozicii diversloke, sed la tradiciaj bibliotekaj servoj estis tre magraj .

Tra la tuta lando, ekzistas bibliotekaj materialoj distribuitaj de KEA dum pluraj renkontiĝoj, vizitoj kaj eventoj, kiuj devas esti en teritoriaj bibliotekoj por servo de la esperantistaro. Tamen, ni konstatas ke tio ne funkcias, eventuale pro ne informado al la esperantistaro kaj ankaŭ pro tio ke en aliaj okazoj la esperantistoj ne multe interesiĝas pri legado, sed grava tasko de la instruantoj kaj de ĉiuj esperantistoj estas diskonigi la legmaterialojn en E-o kaj krei legosenton en la movadanoj. Ĝuste tiel okazas en nia nacia biblioteko ĉe KEA, kiun malmultaj utiligas kaj kies valoro estas aprezinda kaj disvastiginda. Tiusence, bezonatas konstanta agado.

Menciindas ke, kiel rezulto de interparoloj de nia Ĝenerala Sekretariino kun hispanaj esperantistoj kaj reprezentantoj de hispanaj E-grupoj en Valencio, nia biblioteko ricevis gravajn donacojn de E-libroj, kiujn ni disponigos por la publikaj servoj kaj ankaŭ por specialaj uzoj de instruistoj meritplenaj.

6.6. Ni taksas plenumita tre kontentige la stimulado al okazigo de kulturaj kaj klerigaj eventoj, kaj devas esti politiko ĉiujare organizi similajn eventojn en diversaj landregionoj pro tio ke ili kontribuas vigligi nian membraron kaj kreas tre favoran etoson per renkontiĝo kiu provizas ĉiujn je forto kaj frateca sento.

Notindas ĉi-punkte la konstanta kunlaboro de la radioprogramo Juventud 2000 en la diskonigo de niaj kulturaj kaj klerigaj aranĝoj la tutan jaron. Tia sinteno

instigis nin reciproki ilin per vizito kaj transdono de rekona diplomo al la kolektivo de la programo.

## 7. PUBLIKAJ RILATOJ

Niaj publikaj kaj internaciaj rilatoj dum 1997 estis pli aktivaj ol en antaŭaj jaroj pro la fakto ke tiu ĉi laboro dum plejparto de la jaro, estis ligita al la Informa Fako, kaj kompreneble ĝi estas same ligita al aliaj fakoj kiaj la kultura kaj kleriga.

7.1. Rilate al la ligoj kun la kultura vivo de la teritorio, ni daŭrigis kaj plifortigis niajn rilatojn kun kulturdomoj, bibliotekoj kaj aliaj kulturaj institucioj, kiaj la Iberamerika Centro de Camagüey kaj la UNESKO-komisiono.

7.2. Ni daŭrigis kiel tradicie niajn rilatojn kun politikaj, registaraj kaj kulturaj instancoj je ĉiu nivelo, kiel Kultura Fako de la Komunista Partio, la Junkomunisma Organizaĵo, ministerioj pri Kulturo, Edukado, Justico kaj Eksteraj Rilatoj, la Kongresa Buroo, ICRT kaj aliaj.

Ankaŭ kun kulturklerigaj asocioj, kiaj Eldonejo José Martí (nia rilatorgano, kiun ni regule kontaktis kaj invitis al niaj aranĝoj, kaj inverse). Ankaŭ kun UNESKO-komisiono, Kuba UNO-Asocio kaj Fondaĵo Fernando Ortiz kiuj subtenis nian proponon por la Simpozio pri Dro. Ortiz kaj esprimis sian pretecon estonte kunlabori en similaj projektoj. Ni krome restis en kunlaboraj kontaktoj kun Fakultato pri Fremdaj Lingvoj, Supera Instituto Enrique J. Varona, Radio Havano Kubo, kiu en la jaro fariĝis naŭjara E-voĉo en Ameriko kaj plu ricevadis favorajn opiniojn kaj korespondaĵojn el ĉirkaŭ ducent esperantistoj. Samé pli reguliĝis niaj rilatoj kun aliaj radiostacioj tutlande, la Nacia Biblioteko kaj aliaj kubaj institucioj.

## 8. INTERNACIAJ RILATOJ DE LA ASOCIO

8.1. Celante regulajn kontaktojn kun la internacia E-movado, niaj rilatoj konstante aktivis kun UEA, TEJO, ILEI; KUUK, naciaj kaj fakaj asocioj, kaj la E-gazetaro, tiel ke preskaŭ cent el tiaj ricevadis niajn informajn organojn kune kun aliaj informiloj, leteroj kaj komunikoj raportante pri nia agado; speciale al amerikaj landoj, ni sendis raportojn kies celo estis kontribui al evoluo de E-o niakontinente.

Alia formo flegi niajn internaciajn rilatojn estis per akcepto de eksterlandaj gastoj, kiaj Eddy Raats (el Belgio) kaj Vilhelmo Lutermano (el Francio), koreaj, islanda kaj norvega esperantistoj, al kiuj ni informis pri la agado de la movado tutlande kaj sekve ili trairis la landon kaj surloke povis plifortigi siajn ligojn kun

kubaj esperantistoj. Ni daŭre restas en kontakto kun ili kaj ni ankaŭ instigas aliajn esperantistojn veni al Kubo kaj koni nian movadon.

Krome, la partopreno en internaciaj aranĝoj, kiaj la UK kaj ILEI-Konferenco en Aŭstralio, kiel tradicie ebligis al KEA prezenti sian agadon kaj kulturon, kaj donis bonan okazon por informi pri la lando al interesitoj. La UK-on en Aŭstralio partoprenis la prezidanto de KEA pro la aparte multekosta evento. Simile fruktedona estis la partopreno de la Ĝenerala Sekretariino de KEA en la 56a HEF Kongreso kaj la 7a Eŭropa Kongreso en Valencio, kie ŝi prelegis pri kultura temo kaj tradukado kaj raportis pri la agado de KEA kaj ankaŭ pri la lando. Kun Meksika E-Federacio okazis interkonsento pri kunlaboro de KEA por kreskigi la tiean movadon kaj instrui, prelegi, ktp, sed tio pendantas pro la lokaj kondiĉoj en tiu lando.

KEA kontribuis al partopreno de aliaj du kubaj esperantistoj en Eŭropaj eventoj kaj vizitoj, nome de Pedro Peña (al Italio-Belgio) kaj Boris Arrate (al Hungario), ambaŭ el Santiago de Cuba; rezulto de tio estis la ĝemeliĝo de la urboj Santiago-Triesto, danke al vigla subteno de Triesta E-Asocio.

Speciala okazaĵo estis la Subvencio Cigno pere de UEA donita al KEA pro la konstanta plurjara laboro kaj la subtenado de E-disaŭdigoj en RHK.

8.2. Al Latinameriko, ni konstante sendas informojn kiel interkonsentite per la agado de la komisiito pri Ameriko (nome Juan Ramón Rodríguez) kaj invitis panamanojn veni al la instruista seminario, kio fine ne realiĝis, tamen, ni planas plu insisti tiurilate, kiel formo konkrete kontribui al klerigo de la latinamerikaj esperantistoj. Niaj planoj kun Meksiko ankaŭ estas parto de nia kunlabora politiko tiudirekte.

## 9. FAKA AGADO

9.1. Pri atento al interesitoj rilate al fakaj aspektoj, la jaro ne estis kontentiga, pro tio ke mankis viglaj iniciatoj tiusence; tamen, la komisiito pri la laboro, nome Alberto García Fumero, estis en kontakto kun diversaj fakuloj, kiaj la medicinistoj kaj aliaj individuoj interesitaj pri tio kaj esence reagis al informpetoj per la retpoŝto. Tiu ĉi estas fako kiun devas pli kaj pli ankaŭ flegi la estraroj tutlande en la koncernaj teritorioj. Direndas ke tiu ĉi fako bezonas pli da atento, tamen, ankoraŭ ni malhavas sufiĉajn homfortojn tiucele, ĉiel ni konstante alstrebos tion plenumi.

9.2. La konstanta informa agado pri apliko de E-o en scienco kaj tekniko estis plenumita. En majo 97 (16a-17a), la koncerna komisiito kunordigis la Seminarion pri Apliko de E-o en Scienco kaj Tekniko, sukcese sesiinta en Urbo Havano, nome SAEST'97, kiu ĉi foje fariĝis naciskala evento kaj eĉ havis

partoprenon de franca esperantisto Vilhelmo Lutermano, kiu aktive kunpartoprenis. Dum la evento, kubaj esperantistoj prezentis 32 prelegojn pri diversaj temoj de instruado, medicino ĝis alkemio. Cetere, la membroj de KEMA, nome la medicinistoj, oficiale kunsidis kaj alprenis gravajn decidojn.

Aliaj agoj entreprenitaj por informado kaj interkomunikado estis la retpoŝta aktivado, kiu taŭgis kiel informilo pri KEA kaj E-o ĝenerale. Enlande, nur kun Sta. Cruz del Norte, ankoraŭ ne kun aliaj provincoj. Eksterlanden, la komisiito pri fakaj laboraspektoj prizorgis la mesaĝan fluadon kaj insistis pri utiligo de nova firmao kiu nun plibonigis nian retpoŝtan sistemon. Estis preparita ttt-paĝo, kiun oni inkluzivis en la Komputila Rondo, ĝis nun nur hispanlingve, sed eventuale iom post iom oni uzos E-on. Do, ĉi momente, la Asocio disponas je ttt-paĝo kiun vizitas multaj esperantistoj tra la mondo. Alia afero estas iom post iom esperantigi tiun paĝon kaj inkluzivi kroman paĝon kiu funkcios samkiel murgazeto pri niaj aranĝoj, bultenoj kaj multaj aliaj diskonigendaj informoj.

9.3. Oni utiligis diversajn formojn stimuli la fakulojn al apliko de E-o en scienco kaj tekniko, kaj memevidente al tio multe kontribuis SAEST kaj aliaj prelegoj en diversaj klerigaj aranĝoj, kiuj instigadis la esperantistojn al memkleriĝo kaj utiligo de la lingvo en la praktika vivo. Tia sinteno devas esti konstanta en nia agado tutlande kaj tiusence filioj laboris kvankam ne regule. Menciindas la utiligo de E-o far Camagüey en la ligo de la asocia vivo al alilingvaj servoj, historio kaj ĵurnalismo, kaj en tiu ĉi lasta aspekto ankaŭ laboris Santiago kaj Granma, dum la tuta jaro per fiksa radioprogramo.

## 10. HISTORIO

Tiu ĉi punkto ne estis fiksita de la ĉefaj taskoj, tamen, pro ĝia graveco kaj pro tio ke dum 1997 oni laboris tiusence, indas je aparta enmeto en tiu ĉi jara raporto.

10.1. Laŭ interkonsento aprobita dum la antaŭa Komitatkunsido, oni laboris pri kreado de laborkomisionoj por serioze entrepreni farendajn taskojn en la laboro rekuperi kaj verki kiel eble plej detalan historion pri la kuba E-movado. Tiurilate, Juan Ramón faris hispanlingvan version de La E-Movado en Kubo, unua skizo pri nia historio.

Oni diskonigis nian historion en diversaj aranĝoj; pere de informiloj, enlande (eĉ radiofone) kaj eksterlande.

Okazis prelegoj pri la lingvo en diversaj institucioj; menciindas simpozio Fernando Ortiz kaj Esperanto, ĉe la Kuba UNO-Asocio: Juan Ramón Rodríguez disertaciis pri la laboro de la elstara intelektulo favora al la Internacia Lingvo; Juan L. Besada prezentis la temon «Esperanto kaj la internaciaj rilatoj» kaj Georgina Almanza deklamis tekstojn en tiu lingvo. Oni daŭrigis esplorojn, kaj

klasifon de ĉio eltrovita ĝis nun kaj prelego pri rezultoj de tiu laboro estis prezentita dum SAEST'97.

Oni preparis cirkuleron #4, kaj pretigis la bezonatajn dokumentojn por ekkomenci (aŭ daŭrigi) la esploradon pri historio de Esperanto diversloke tra la lando. Tiusence, la filio Camagüey faris tre seriozan laboron en la kompilado de materialoj, verkado kaj presigo de broŝuro pri la historio de E-o en tiu provinco. Simila laboro en aliaj teritorioj pendantas ankoraŭ, sed ĝi restos inter niaj farendoj por la nuna jaro.

## 11. LIBROSERVO

11.1. La agado de KEA tutlande en tiu ĉi fako estis relative kontentiga, se ni komparas ĝin kun antaŭa periodo, tamen ni devas konsideri tiun ĉi laboraspekton pli zorgeme, tiel ke ĝi grave influas en la financa vivo de la Asocio kaj konsistigas servon kiun ni devas nepre flegi je la sano de la movado. Precize tial ni dediĉas al tiu ĉi ero specialan punkton en nia jarraporto. Pro praktikaj kialoj kaj ankaŭ pro manko de laborfortoj, nia estrarano pri Internaciaj kaj Publikaj Rilatoj kaj, krome, komisiito pri Historio, ankaŭ laboris pri Libroservo kaj Biblioteko; kaj kompreneble ni jam en la praktiko sekvos alian strategion, tiel ke nia libroservo dum 1998 estu pli vigla kaj, krome, nepre ni devas investi por provizi la libroservon je taŭgaj kaj utilaj esperantaĵoj, libroj, ktp.; tamen, dum 1997, oni faris ĝeneralan inventarion pri la ekzistantaj materialoj, kun la koncerna kupono por mendi ilin (laboro prezentita en SAEST'97).

Oni vendis librojn, gazetojn kaj aliajn materialojn kaj la koncernaj kontroloj estis faritaj, sed la ĝeneralaj rezultoj ne estis vere kontentigaj, kvankam ankaŭ ne malbonaj, konsidere al la limigita kvanto kaj kvalito de la materialoj disponeblaj.

Ni devas diri ke la nuntempa aĉetovenda sistemo ne glate funkcias inter nia Libroservo kaj la filioj, kio tre ampleksigas la tempon dum kiu nek la mono nek la materialoj posedataj de filioj plenumas sian veran rolon iel-aliel. Ni proponas ŝanĝon de la sistemo kaj funkcii kiel vera librovendejo kun la celo ke la rezulto respeguliĝu en la plibonigo de tia servo kaj ties kvalito por la efektiva sano de la Asocio je nacia nivelo.

## 12. TURISMAJ ARANĜOJ

12. Dum la jaro oni iniciatis pli regulan agadon tiudirekte per laboro de komisiito pri Turismo, nome Marta Alonso, kiu interesiĝis pri tiaspeca agado flanke de KEA. Tiucele, ŝi mem eklaboris kaj preparis diversajn programerojn, unualoke, Ronda Tablo pri Turismo kadre de SAEST'97, por kio estis disdonitaj demandoj al elektitaj partoprenintoj, kaj en la praktiko evidentiĝis ke la temo estis atentoveka, tial ke la tempo ne sufiĉis por plenumi ĉion deziratan; tamen, ĝi

markis startpunkton en tiu laboro, kaj oni konsideras ĝin sukcesa ekde tiu vidpunkto, eĉ kiam la koncerna Komisiito ne povis vere plenumi ĉiujn atendojn. La Rondan Tablon partoprenis reprezentantoj el Guantánamo, Santiago de Cuba, Camagüey, S. Spíritus, Sto. Domingo, U. Havano, Nacia Estraro kaj la Komisiito.

Aliaj taskoj dum la jaro estis grava kunsido en municipo Centra Havano, kiun partoprenis havanaj esperantistoj kaj naciaj estraranoj por analizi la celojn de turisma agado en Kubo. Post longa debato, oni decidis labori pri turisma agado en la Insulo.

Oni faris enketon pri gastigado de eksterlandaj turistoj en la diversaj teritorioj, sed vera reago al tiu enketo venis nur de Morón, Sto. Domingo (ne estis ricevita) kaj Guantánamo. Nuntempe, ekzistas komisiitoj pri Turismo en Morón, Guantánamo kaj Villa Clara-Cienfuegos.

Okaze de la vizito de Sro. Lutermano al Kubo, depost lia trairo insule, la Komisiito kunsidis kun li pri turismaj eblecoj kaj li faris kelkajn rekomendojn laŭ la spertoj ricevitaj. Poste, li per la retpoŝto petis kelkajn informojn pri prezoj por esperantistoj kiuj deziras turismi en Kubo, kaj ankaŭ ĉar pluraj homoj interesiĝas pri la festivalo en Santiago de Cuba. Kvankam oni ne posedis ĉiujn deziratajn informojn el provincoj, ni reagis al la peto de Sro. Lutermano, kiu cetere verkis por la revuo Esperanto propralniciate, tre instigan kaj informivan artikolon pri eblecoj kaj siajn spertojn turisme en Kubo. Krome, ni reagis al aliaj 17 informpetoj el diversaj landoj.

En septembro, ni malfermis laspecan kurson kun grupo de esperantistoj en Urbo Havano, kiuj interesiĝas pri turisma agado kaj ebla laboro kiel turismaj gvidantoj. La kurso tre stabile funkcias kaj ĝi povas esti fonto de estontaj iniciatoj por vere prepari la esperantistojn tiusence.

Tamen, la asocianoj devas konscii ke turismo esperantista ĝis nun nenie estis piliero de movadoj, kvankam ĝi povas multe kontribui al plifortigo de esperantismaj interŝanĝoj kaj tiucele ni vidas ĝin kiel nutriva laborkampo, kiu neniel devas forpreni de la kubaj esperantistoj la sindoneman trajton pri gastigemo -laŭ la realaj kondiĉoj de ĉiu persono-, kiu karakterizas la spiriton de la movado kaj igas nin fieraj pri nia esperantisteco.

Ĝenerale, dum la jaro, turismado estis parto de niaj faritaj taskoj, kaj esence enlande ĝi funkciis tre vigle en Urbo Havano kaj ankaŭ en la kadro de la naciaj renkontiĝoj organizitaj en Camagüey, Sancti Spíritus kaj Guantánamo, ĉar tiamaniere la kubaj esperantistoj partoprenintaj tiajn renkontiĝojn ĝuis sian restadon kiel naciaj turistoj en esperantista etoso.

## 13. TRA LA FILIOJ (RESUME)

13.1. Camagüey: Vigla kaj kohera teamo konfirmis sian stabilan agadon. La membraro daŭre kreskis ĝis 191 membroj. Ili regule kunsidis, protokolis kaj

kontrolis sian membraron, kaj agis postuleme pri sendado de informoj. Aktive kunlaboris kun la prestiĝa institucio Iberamerika Kulturcentro, kie ili inaŭguris oficejon kaj havas klasoĉambron, krom alia en la lernejo, kaj ankaŭ biblioteko. Tie, ili ekfunkciigis E-katedron. Dum kontrolvizito de la NE, ilia laboro estis tre bone taksita en ĉiuj aspektoj, krom pri manko de provinca bulteno. Do, post kelkaj monatoj, ili lanĉis la unuan numeron de la provinca bulteno, kies nomo estas Antaŭen (jam ricevinta reagojn el en-kaj-eksterlande). Ili sukcese organizis nacian renkontiĝon, kiun partoprenis reprezentantoj el aliaj provincoj.

Ili vigle diskonigas kaj informas pri E-o en publikaj aranĝoj, per la provinca ĵurnalo, en radioprogramoj, en lingvolernejo. Ilia propaganda laboro ankaŭ elstaras en la grafika kampo per eldonado de kelkaj informaj materialoj hispanligve kaj speciale per eldono de broŝuro pri la historio de E-o en la provinco, post serioza agado tiucele.

Kursoj okazas en la lernejo Fernando Ortiz kaj dividite en baza, libera, perkoresponda kaj konversacia. Ĝenerale, plialtiĝis en la provinco la intereso pri E-o kaj ilia agado tiusence fariĝis pli kvalita.

13.2. Granma: La provinca filio devis plenigi sian Estraron unualoke, kaj sekve la fakto ke la Komitatkunsido ĉi jara okazas sur tiu teritorio multe pli impulsis ilin al kontaktado, organizado kaj senĉesa laboro por plenumi tian respondecon.

La membraro, konsiderinde kreskis ĝis rekorda cifero por la filio, nome 56. Ili regule kunsidis kaj sendis siajn protokolojn kaj membrokontrolojn kun kotizoj al la Nacia Estraro dum la tuta jaro. Pri propagando kaj informado, la filio agadis per radioprogramo kaj en la provinca televizio. Spite al streboj, ili ne sukcesis eldoni sian bultenon, sed ili uzadis diversajn materialojn kaj ricevitajn gazetojn por ekspozicioj.

La filio instruis regulajn kursojn kaj ankaŭ atentis la PKK-on sufiĉe stabile kaj havas projektojn por instrui en kamparaj komunumoj.

La rilatoj kun politikaj kaj kulturaj instancoj en la teritorio estas bonaj, kaj ili rigore renkontiĝis kun la reprezentanto de MINJUS en la teritorio, la biblioteko kaj aliaj institucioj. En la kultura agado, la Asocio organizis diversajn aranĝojn en la komunumo kaj aktive partoprenis naciajn renkontiĝojn en aliaj teritorioj.

13.3. Sancti Spíritus: Membro-kontrolo kaj kotizo estis aktualigitaj, sed kun iom da malfruo en la dua semestro, pro specifaj kialoj de la grupo en la vilaĝo La Aurora. La prezidanto, Norberto Díaz, persone kontribuis per instruado al disvastigo de E-o en provinco Cienfuegos. La membraro de la filio ne kreskis dum la jaro. Ili alstrebis por plenumi decan informan laboron en la loka radiostacio per intervjuo kaj aliaj informoj. La bulteno Jajabo daŭre aperis kaj estis dissendita tra la Insulo kaj eksterlanden kie ĝi jam konatas. Ne prosperis malfermo de regulaj kursoj, malgraŭ pluraj kontaktoj kun interesitoj, sed la PKK iom kreskis, kvankam ne laŭ planite. La kultura agado en la provinco estis nula;

tamen, ili organizis kunsidon de la centra regiono kaj nacian renkontiĝon kun partopreno de aliaj filioj, kio kompreneble ankaŭ kontribuis al aktivado en la kultura flanko, okaze de tiaj eventoj. Aktivas la rilatoj kun la kulturaj institucioj, la biblioteko kaj aliaj instancoj de la teritorio.

13.4. Villa Clara: Tre bone fluis la informoj kun la municipa grupo de Sto. Domingo, kiu daŭre estas la sola organizita movado en la teritorio. Ili tre aktivis ekde kultura flanko kaj regule plenumis diversajn renkontiĝojn kaj vizitojn al aliaj proksimaj teritorioj. La prezidanto, José Luis Montes de Oca, aktive laboris en la disvastigo de E-o al provinco Cienfuegos kaj tie plu laboras; tamen, kiel sciate, la movado en la provinco mem restas malantaŭe kaj ankaŭ havas grupon de knaboj esperantistaj, kiuj partoprenas en diversaj regionaj kaj lokaj renkontiĝoj. Ili estis reprezentitaj dum SAEST'97. La grupo restas stabila ekde organiza vidpunkto kaj la membraro same. Kvankam protokoloj ne regule venis, la prezidanto regule leteris al la NE kaj konstante fluis informoj.

13.5. Matanzas (Pedro Betancourt): La E-grupo en tiu regiono estas malmultenombra, sed dum la jaro ili disvastigis informojn pri E-o kaj okazigis neregulajn kunsidojn. Ili aktive laboris en E-instruado al geinfanoj, kiuj partoprenas en diversaj kulturaj aranĝoj en kaj ekster la teritorio. Ili finis kurson de adoltoj, sed nuntempe tiaj kursoj ne plu daŭras pro manko de laborfortoj. Ili partoprenis kulturan infankonkuron pri kanto en la teatro de la vilaĝo kaj ricevis premion; kaj agadis ĉe la kulturdomo. La grupo estis reprezentita en la regiona renkontiĝo en Sancti Spíritus kaj Camagüey; aktive kunlaboris en la porinfana agado kun Sto. Domingo en Villa Clara. La grupon influis internaj kontraŭdiroj pri labormetodoj, kio ege malhelpis en stabila kaj pli efika laboro, varbado kaj kontrolo de siaj membroj; tamen, ili plu agadas laŭ la disponeblaj fortoj.

13.6. Urbo Havano: La filio adoleskis pri kompleta estraro, kio malhelpis en diversaj laborsferoj. Ili ne sukcesis arigi teamon; kaj, malgraŭ regule kunsidis, protokoloj ne estis senditaj al la NE. Membrokontrolo estis aktualigita sufiĉe akurate, ili plenumis la jaran buĝeton kaj konscias pri la memfinancado. La filio malfermis regulajn kursojn, sed la teritorio havis tiklajn malfacilaĵojn; interalie, malpermeson de Ministerio pri Edukado, rilate al utiligo de la lernejoj. Pri PKK, nenio estis farita kongrue al interkonsento de la antaŭa Komitatkunsido. Mankis laboro en la kultura agado, sed ankaŭ malpliiĝis kvanto de partoprenintoj. Aliflanke, la filio tre aktivis pri turismaj renkontiĝoj per organizo de tendaroj en la provinco kaj en la speciala municipo Isla de la Juventud. La informa laboro estis aktiva, ĉefe per radioelsendoj kaj okaze de novaj kursoj per grafikaj propagandiloj. Esence, la jaro estis tre streĉiga por la havana movado, kiu sukcesis en la dua semestro altigi sian membraron draste falinta dum la unua semestro; tamen, la sola oficialigita municipo Centra Havano entute disfalis (estraro) kaj ili havas antaŭ si la defion revigligi tiun iaman firman filion. Menciindas ke, precize ĉijare, tiu municipo ricevis lokalon kaj, kun grandaj

streboj kaj ankaŭ kontribuoj esperantistaj, sukcesis ekfunkciigi ĝin. La NE okazigis tie la centran solenaĵon okaze de la 18a datreveno de KEA, kiun partoprenis Jacinto Granda, vicprezidanto de la Kuba Instituto de l' Libro.

## JARA BILANCO / 97

**Enspezoj**

| | Buĝeto | Realo | % |
|---|---|---|---|
| 1. Kotizoj | 7 700.00 | 4 153.30 | 57 |
| 2. Perk. Kurso | 1 800.00 | 639.80 | 36 |
| 3. Libroservo | 3 000.00 | 2 021.00 | 67 |
| 4. Aliaj Servoj | 9 000.00 | 8 235.50 | 92 |
| | 21 000.00 | 15 049.60 | 72 |

**Elspezoj**

| | | | |
|---|---|---|---|
| **Centra Oficejo** | | | |
| 1.1.1 Afranko | 250.00 | 260.85 | 104 |
| 1.1.2 Telegramoj | 100.00 | 72.70 | 73 |
| 1.2 Salajro | 9 600.00 | 8 400.00 | 88 |
| 1.3 Imposto | 5 000.00 | 4 216.53 | 84 |
| | 14 950.00 | 12 950.08 | 87 |
| **Nacia Estraro** | | | |
| 2.1 Komitatkunsido | 1 200.00 | 1 200.00 | 100 |
| 2.2 Kontrolvizitoj | 1 200.00 | 1 200.00 | 100 |
| 2.3 Estrara Rezervo | 600.00 | 530.00 | 88 |
| | 3 000.00 | 2 930.00 | 98 |
| **Investoj** | | | |
| 3.1 Investoj por Sidejo | 300.00 | 335.00 | 112 |
| 3.2 Investoj por servoj | 1 000.00 | 916.50 | 92 |
| 3.3 Eldonagado | 200.00 | 200.00 | 100 |
| | 1 500.00 | 1 451.50 | 97 |

===========

17 331.58

| | |
|---|---|
| KEA 31/12/96 | 18 313.15 |
| Ensp / 97 | 15 049.60 |
| Elsp / 97 | 17 331.58 |
| KEA 31/12/97 | 16 031.17 |

ĈEFAJ TASKOJ DE KUBA ESPERANTO-ASOCIO POR 1998

1. INFORMADO

1.1. Regula informado pri E-o, la internacia E-movado kaj KEA, pere de ĉiuspecaj amaskomunikiloj, kaj per aliaj rimedoj, kun emfazo en la grafikaj, tiel ke la ĝenerala publiko pli bone sciiĝu pri nia agado.

1.2. Konsciigi la membraron pri la bezono kaj graveco entrepreni personan kaj konstantan informadon pri KEA kaj E-o en sia medio por varbi novajn membrojn kaj amikojn de E-o.

1.3. Garantii la eldonon de la organo Avanco (3-foje jare), La Noktuo (6-foje), Universo kaj aliaj filiaj bultenoj kaj ties distribuon al enlandaj kaj eksterlandaj amaskomunikiloj kaj institucioj.

1.4. Ebligi regulan aperon de KEA en la internacia E-gazetaro.

1.5. Atenti la oficialan hejmpaĝon de KEA kaj regule ĝisdatigi la informojn.

2. NACIAJ KAJ INTERNACIAJ EVENTOJ

2.1. Okazigi du naciajn renkontiĝojn .

2.2. Garantii la efektivigon de la Kultura E-Festivalo en Santiago de Cuba kun internacia partopreno.

2.3. Pretigi kondiĉojn por sukcesigi la 3an Nacian Kongreson de KEA, 1999.

3. DISVASTIGO TRA LA LANDO KAJ REVIGLIGO DE FILIOJ

3.1. Labori por revigligi la movadon en tiuj teritorioj kun jura personeco: Villa Clara, Ciego de Ávila, Havano.

3.2. Labori por kreskigi kaj firmigi la movadon en Matanzas, Las Tunas, Pinar del Río, Holguín, Cienfuegos kaj Isla de la Juventud.

4. ORGANIZAJ DEMANDOJ KAJ INTERNA ADMINISTRADO

4.1. Membro-kontrolo kaj kotizo.

4.2. Atento kaj vizitoj al filioj.

4.3. Kontrolo kaj atento al membroj-subtenantoj.

4.4. Atento al komitatanoj. Flegi la internan informan fluon.

5. PUBLIKAJ RILATOJ

5.1. Rilatoj kun politikaj, registaraj, edukaj kaj kulturaj instancoj je ĉiu nivelo; daŭre teni viglajn kontaktojn kun la rilatorgano. Kunlabori kun tiaj instancoj laŭeble.

5.2. Ligi la asocion al la kultura vivo de la koncerna loĝloko. Rilati al aliaj asocioj kulturklerigaj.

6. FINANCOJ

6.1. Fiksi strategion por plenumi efike la buĝeton de la nacia banko, BFI kaj PF-kontoj.

6.2. Atenti la filiojn kaj kreskigi la konscion pri memfinancado je ĉiuj niveloj.

6.3. Flegi la eldonan politikon ekde financa vidpunkto.

7. INSTRUADO

7.1. Regulaj kursoj

7.2. Kreskigi la PKK-n kaj daŭre atenti ties partoprenantojn diversmaniere.

7.3. Okazigi provincajn seminariojn por altigi la lingvan kaj kulturan scipovon de aktivuloj rilate al E-o.

7.4. Ekspluati kaj profiti ĉiujn rimedojn por altigi la lingvan kaj kulturan nivelon de nia membraro: distanca kurso, konkursoj, prelegoj, ktp.

7.5. Atento al ILEI-sekcio kaj al ties respondeculoj en la diversaj filioj.

7.6. Tutlanda kaj filiaj seminarioj.

8. KULTURAJ KAJ KLERIGAJ ARANĜOJ

8.1. Konsciigi la membraron pri la historiaj kaj kulturaj valoroj de la movado pere de ĉiuj disponeblaj rimedoj.

8.2. Flegi la kulturan aktivadon de la filioj kaj provizi ilin per taŭgaj materialoj tiucele.

8.3. Atenti la jam ekzistantan reton de amatoraj kaj profesiaj artistoj kaj varbi novajn.

8.4. Stimuli la asocian reprezenton en kulturklerigaj eventoj eksterasociaj.

8.5. Zorgi pri korekta utiligo de bibliotekaj servoj je ĉiuj instancoj kaj ebligi tiajn servojn en tiuj teritorioj kie ankoraŭ ne estas.

8.6. Stimuli la filiojn okazigi regionajn renkontiĝojn kulturklerigajn.

8.7. Kontroli, zorgi kaj atenti la preparlaborojn por la kultura programo de la Festivalo en Santiago de Cuba.

## 9. INTERNACIAJ RILATOJ

9.1. Teni regulajn kontaktojn kun UEA, latinamerikaj landaj asocioj, ILEI, Germana E-Asocio kaj aliaj landaj asocioj, lokaj kluboj, kaj aliaj E-institucioj.

9.2. Daŭra kontribuo al evoluo de E-o en Latinameriko; garantii reprezenton de la Asocio en la 3a Tutamerika Kongreso kaj helpi al ties sukceso.

## 10. FAKA AGADO

10.1. Atento al interesitoj pri faka agado tutlande.

10.2. Daŭre informi al la membraro pri apliko de E-o en scienco kaj tekniko enlande kaj eksterlande.

10.3. Stimuli fakulojn al utiligo de E-o en scienco kaj tekniko.

10.4. Okazigi renkontiĝon de medicinistoj.

## 11. LIBROSERVO

11.1. Daŭre labori por kreskigi la stokon de materialoj kaj esperantaĵoj en la libroservo.

11.2. Zorgi pri la korekta kaj efika funkciado de la libroserva sistemo tutlande.

## 12. TURISMA AGADO

12.1. Atento al interesitoj pri turismado en Kubo kaj reagi al tiaspecaj informpetoj.

12.2. Pretigi lokajn esperantistojn ekde turisma vidpunkto por atenti esperantistajn turistojn kaj vizitantojn.

ALIĜILO

DUA KULTURA FESTIVALO DE ESPERANTO

20-22 NOVEMBRO 1998

SANTIAGO DE CUBA

Konstanta adreso:
Kuba Esperanto-Asocio
pk 5120 Havano
fakso (537)338729
email: kubesp@mail.infocom.etecsa.cu

Familia nomo: ____________________ Nomo: ____________________

Partoprenos kiel:

Solisto: ___ Trupo: ____ Grupo: ____ Preleganto: ______ Partoprenanto: _______

Muziko: ____ Teatro: ____ Koruso: _____ Alia: _____

Kompleta adreso: ________________________________________

Municipo: __________ Provinco: ____________ Poŝta kodo: ___________

Profesio/Fako: ____________ Aĝo: _____ Sekso: _____ Telefonn-ro: _________

Bezonatas jenaj iloj: projekciilo ____ lumoj: _____ sono: _____ alia: _____

Sinoptiko pri la verko: ________________________________________

____________________________________________________________

____________________________________________________________

____________________________________________________________

____________________________________________________________

Tempodaŭro: ______________________

Mi sendas ĉi tiun aliĝilon kaj pagas per ĝiro rekte al la Loka Preparkomitato _____

Mi pagas surloke per kontanta mono ____

Dato: ______________ Subskribo: ______________________

Ciferecigis: Javier Ramos
@Radioamatoro